

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 47 Aŭgusto 13, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alk: 382, Sume: 812 KB

temas nur pri PDF, kiun SMG mem aliroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipite koneblaj.

Premio Deguĉi aljuĝita al Madagaskarino

Ĝin ricevis s-ino Miora Raveloharison el Madagaskaro pro elstara agado. Ŝi siatempe estis delegito pri evangelia kristanismo, kaj lastatempe akiris la titolon de Doktorino pri teologio. Premio Deguĉi estis fondita en 1987, honore al la memoro de Onisaburo Deguĉi, kunfondinto de la Oomoto-movado. Inter la celoj de la premio estas 'kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj'.

Parte laŭ informoj de Mirejo Grosjean.

Pliaj informoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Premio_Degu%C4%89i
inkluzive de listo de la ricevintoj tra la jaroj.



Serbaj junuloj sukcesis partopreni en Linjano-Orsabla

Inter la 5-a kaj 12-a de aŭgusto 2023 kvin membroj reprezentas Serbian E-Ligon (SEL) en la komuna kongreso de TEJO kaj ILEI, en Italio, en Lignano Sabbiadoro:

- **du junuloj** partoprenas la internacian seminarion „**Partoprenu! Plibonigante junularan civitan spacon per pli fortaj junularaj organizoj**“, kiun – enkadre de **IJK** – organizas TEJO, kun la financa subteno de la Konsilio de Eŭropo, por 20 junaj stipendiuloj;
- **du instruistinoj** partoprenas la **ILEI-kongreson** danke al la Erasmus+ KA-1 moviĝprojekto, kiun SEL realigas kunlabore kun Kosmo Strategio.



Raportas: Aranka Laslo

AMO 102 okazis en la Kongreso de ILEI

La seminario aliris 18 retajn partoprenantojn el Britio (1), Ĉinio (3), Germanio (1), Irano (1), Italio (2), Hungario (1), Kolombio (3), Kroatio (2), Mongolio (1), Pollando (1), Serbio (1), Svedio (1) kaj Svislando (1) plus tri pliaj, kiuj ne anoncis sian landan apartenon, spite du invitojn fari tion. Krome partoprenis fizike en Lignano inter dek kaj dudek personoj. Enkonduke, la prezentaĵo de SMG skizis la rolon de interkulturo en lernejoj, komencinte de la rolo de Mauro la Torre, kiun reprenis kaj rafinis la sekva prezentaĵo de Renato Corsetti, kiu multjare konis Maŭron. ILEI nun provas plue vivi interkulturon per la nomo 'Latorre'.

Poste parolis Anna Lowenstein pri la uzo de limigita vortrezoro kaj sia laboro krei difinaron por la tekstoj en <facila.org>. Intervenis Marija Jerkoviĉ el Kroatio kaj estrarano de ILEI, kiu interalie informis, ke ILEI akceptis novan sekcion en Ganao. Esploroj daŭras pri la starigo de sekcio en Kenjo.

Finaj rezultoj el la UK

Al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Torino, aliĝis 1319 personoj el 69 landoj; plej multe el Francio (206), Italio (176) kaj Germanio (108). Legu pli en la novaĵretejo 'La Ondo de Esperanto'

<https://sezonoj.ru/2023/08/torino-32/>

Ondo: Ni estas kontraŭ milito, ni estas por paco!

La retejo por vi: <https://sezonoj.ru/>. Ni en Telegramo: https://t.me/esperanto_news

Belartaj Konkursoj - rezultoj

Miguel Fernández, Prezidanto de la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA, diskonigas la liston de verkoj kaj verkistoj premiitaj en 2023:

<https://youtu.be/CIUamy7RoJw>

En la Belartaj Konkursoj de 2023 la Infanlibro de la jaro fariĝis 'La malbela knabino' de Veronika Marék, tradukita de la karmemora hungaro János Sárközi kaj eldonita de Verda Stelo Esperanto-Asocio de Nyíregyháza. Multajn gratulojn al la eldoninto, por kiu ĉi tiu libro estas ne la unua eldonaĵo.

SMG: La verko estas ankoraŭ ne akirebla en la Libroservo de UEA, sed certe tio iom post iom okazos.

Infanlibraj eroj: Jozefo Horvath, vortaro.hu

Kosmo kaj Kasini/Grassini kune

Jen intervjuo kun Francesco Maurelli kaj Sara Spanò pri la Erasmus-projektoj kunordigataj de Kosmo Strategio. Inter ili estas la 30 Oraĵ Horoj.

Mi esperas, ke Mirinda kapablos korekti kelkajn eraretojn en la video (Bruĉjo Kasini iĝis Aldo Grassini...). Sed la intervjuo ĝenerale estas interesa.

<https://esperanto.cri.cn/2023/08/04/ARTIGz4ihWLpfC4q4tZAJp11230802.shtml>

Alessandra Madella

Penseo petebla

Ni ĉesas alkroĉi la poezian rikoltejon el Ĉinio, pro la pezo, eĉ post sveltigo. Kiu deziras ĝin daŭre ricevi, petu tion de <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Dua forumo en UK: Instruado en la 1-a de aŭgusto

1. Aurora Bute prezentas la kuntekston de Eo-instruado en Eŭropo, Azio kaj Afriko, kaj konkretajn iniciatojn. UEA kaj ILEI provizas kvalitajn kaj altnivelajn rimedojn por diverskampa kapablo: Nova nivelo KER-C2 en la ekzamensistemo de UEA, partnereco inter UEA kaj la Akademio (AdE) por agnosko de la KER-ekzamenoj. Estas konfirmata la tria mandato de la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo en Hago por la daŭra laboro de Federico Gobbo.
2. Duncan Charters parolis pri la graveco trovi preparitajn instruistojn se lerneja sistemo interesiĝas pri la instruado de Esperanto. Ni ekzameni niajn rimedojn, aparte <edukado.net>, kun pli, kaj krome havu konsult-servon por novaj instruistoj.
3. La NASK-kursaro plibonigis la lingvo-nivelon de usonanoj. Instruado do povas inkluzivi novajn lernantojn sed ankaŭ aliajn nivelojn. Ĉi-jare venis 60 kursanoj. En nia instruado ni devas provizi rimedojn por progresigi lernadon je ĉiuj niveloj.
4. Ni devas trejni kaj la lernantojn kaj la instruistojn, do ni planu kiel prepari gvidilojn. Preferindas la retaj kursoj KUN instruistoj, por allogi la kursanojn al la agado: la sukceso de la Kolombia kurso dependis de tio kaj efika varbado de novaj esperantistoj. Necesas trejnado por profesiigi la instruistojn.
5. Ni starigu kun ILEI komisionojn kies tasko estas prepari la vojon al pli vasta akcepto de Esperanto en la lernejoj. Tio estus ne nur por povi pli facile lerni la lingvon. Hodiaŭ kulturaj interŝanĝoj estas vaste dezirataj. Ni maturigu la grundon, ĉar nur Esperanto kapablas provizi egalecan sperton kun tutmonda interkultura riĉiĝo post relative mallonga tempo en la lernado. Ni atentu por instruistoj bonan prepariĝon por gvidi interkulturajn lingvoklasojn. Lernantoj bone lernu, ĉu kun instruisto aŭ ne.
6. Gong Xiaofeng (Arko) prezentis la nunan situacion de Eo-kursoj en Ĉinio, iom pesimisma, pro emeritiĝo de pluraj instruistoj en kernaj universitataj postenoj. Alessandra Madella prezentis la projektojn de ILEI, kiuj sukcese okazas, iuj kun stipendioj de Eŭropo: Esperanto-kursaro Tibor Sekelj (EToSo), 30 Oraj Horoj.

...kaj sekve estas naŭ

En sia unua Torina kunsido la komitato de UEA elektis novan estraranon (la naŭan), s-inon Gong Xiaofeng el Ĉinio, kiu en Esperantujo estas konata ankaŭ kiel Arko. Konatiĝu kun la nova estraranino en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto"
<https://sezonoj.ru/2023/08/gong/>

Tago de Junularo

Okaze de la Internacia Tago de la Junularo, la 12-an de Aŭgusto, ni invitas vin pripensi la protagonismon junularan en la konstruado de Paco. En nia mondo dense militarigita, kie kaj kiel komenci?

Komuniko de Legio de Bona Volo, Brazilo



Nederlandano la gasto en la dimanĉa kunsido de IKEF

La 127-a Dimanĉa Kunveno de IKEF (niaj komercistoj) per Zoom kaj Voov!
Temo: uTalk Esperanto kurso (s-ro Rob Ebenau). Dato: dimanĉe, la 13-an de aŭgusto 2023; Horo: UTC 12:00-14:00. (中国时间 20:00-22:00)

Kondukanto: s-ro Longarko Zhang Changsheng (Prezidanto de IKEF-Ĉinio)

Platformo Zoom: <https://us06web.zoom.us/j/83150900604>.

Kunvena kodo: 831 5090 0604; Pasvorto: Jr4shj2Y

Plia platformo Voov: <https://meeting.tencent.com/dm/POSmsnxMLrvX>

Kunvena kodo: 734-3716-2461 (por la jaroj 2022-2023)

IKEF-Estraro

La revuo 'Esperanto en Afriko' aperis

<https://uea.org/v/images/c/cf/Esperanto-en-Afriko-46.pdf>

La homoj kun la poŝtelefonoj ne vidas ĉion. Temas pri raporto de la 8-a Afrika Kongreso kun 55 partoprenantoj en Senegalio en decembro 2022.

Ni alkroĉas helpilon pri la imperativo.

SMG havas multan instruan materialon, kiun peco post peco nmi sendas al ILEI, kaj, kie eble mi aldonas tion al EKO-komuniko. Pezo: 382 KB.

La kvara kaj kvina tagoj de la Kongreso de ILEI

La kvina tago

<https://youtu.be/On8vS7ruViE>

La kvara tago

<https://youtu.be/2L2jtYtApT4>

Kontinentaj Komisionoj sukcesis kunsidi

Dum la UK okazis ĉiuj planitaj kunsidoj de la kontinentaj komisionoj de UEA:

- Afrika Komisiono
- UEA-Komisiono pri Eŭropa agado
- Mez-Orienta kaj Nord-Afriko (MONA)
- Amerika Komisiono
- Azia komisiono (KAOEM)

===== vortoj: 1080 =====

La kolekto de EKO: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 42).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@uea.org>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingenuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj. Pri petoj pri forfaligo el la ricevantoj.